IPR

Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031
Jarkolekto 55 - trimonata
2025/3

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:
József Németh (red.)
Mireille Grosjean
Luigia Oberrauch Madella
Ahmad Reza Mamduhi
Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:
Marija Belošević
Shanshan Chen
David Depew
Du Xin
Mireille Grosjean
Aranka Laslo
Nedeljka Ložajić
Alessandra Madella
Ahmad Reza Mamduhi
Vicente Manzano-Arrondo
Françoise Noireau
Carlos E. de Oliveira
Miora Raveloharison
Samir Ribić
Bardhyl Selimi
André Staes
Russell Scott Valentino
Wu Jing
Andreas Zervas



ilei

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ENHAVO

Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI) 3
Raporto pri la ILEI-kongreso en Beogrado (Aranka LASLO) 4
Impresoj pri la ILEI-kongreso (RAVELOHARISON, ZERVAS, OLIVEIRA, LOŽAJIĆ)... 8
Simpozio de ILEI 2025 9
Rezolucio de la 58-a Kongreso de ILEI 16
Raporto pri la 110-a UK en Brno (A. MADELLA, M. GROSJEAN) 18
Tago de Lernado (Marija BELOŠEVIĆ) 21
La Vojo de Renato (Mireille GROSJEAN, Ahmad MAMDUHI) 23
Françoise NOIREAU: *AI en instruado* (nova rubriko)..... 26
Gratulo al Mónika Molnár (Ahmad MAMDUHI) 28
El la landoj kaj sekcioj (AL, BE, CN, FR, RS, CH)..... 29
Gajnintoj de la konkurso Instruistoj de la jaro 2024 34
Informoj pri ILEI kaj IPR..... 37

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Ahmad Reza MAMDUHI, Nr. 9, K. Iraj, Kh. Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-Afshar, Kh.Vahid Dastgerdi, Tehran-1916613514, Irano. Tel. +98 9122115419 (Telegram, WhatsApp). <*mamduhi@gmail.com*>. Universitata agado, ekstera komunikado kaj varbado, observanto kaj komitatano A ĉe UEA.

Sekretario: Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. +7 919-670-25-34. <*lena_espero@mail.ru*>. Lerneja agado.

Estrarano pri financoj: Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio. *ilei.kasisto@gmail.com* (financoj). Tel.+374 55 279906 (Viber, WhatsApp), <*karinko_arm@mail.ru*>. Ekzamenoj.

Vic-prezidanto: Alessandra MADELLA, via Prampolini 8, IT-43122 Parma, Italio. Tel. +39 0521 785582, <*a.madella@tiscali.it*>. Lerneja, universitata, scienca, landa kaj regiona agadoj (Orienta Azio), ekstera komunikado kaj varbado.

Estrarano pri kongresoj: Laura BRAZZABENI, via San Filippo 52, IT-58031 Arcidosso (GR), Italio. <*laura.brazzabeni@gmail.com*>. Tel. +39 3286461063 (WhatsApp). Lerneja agado.

Estrarano: Marija JERKOVIĆ, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Tel. +385 981771741. <*mjerkovic@net.hr*>. Lerneja kaj landa agadoj.

Estrarano: Fernando PITA, R. S. Francisco Xavier, 681, bl E, ap 201, Maracanã - cep: 20550-011, Rio-de-Ĵanejro, Brazilo. <*magisterpita@gmail.com*>. Tel. +55 21 98863-3854 (Telegram, WhatsApp). IPR, universitata kaj scienca agadoj.

Estrarano: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <*radojica.petrovic.rs@gmail.com*>. Tel. +381 64 8525321 (Viber, WhatsApp, Telegram). Eduk-projektoj, universitata agado, instrukapabligado.

Estrarano: Aimé-Patrick MANIRAKIZA, Buhomba 7 Nr 39, Maramvya, Bujumbura, Burundo, Tel. +25779813485 (Whatsapp, Telegramo), <*apmanirakiza@gmail.com*>. Agado pri Afriko, observanto ĉe TEJO.

Scienca Komitato

***Prezidanto*: Humphrey Tonkin**, Usono, University of Hartford
***Membroj*:**
Duncan Charters, Usono, Principia College, Elsah; AdE[1]
Probal Dasgupta, Barato, emerita profesoro de LRU, Indian Statistical Institute, Kolkata; AdE[1]
Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių universitetas
Boris Kolker, Usono; AdE[1]
Ilona Koutny, Pollando/Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu
Stefan MacGill, Nov-Zelando/ Hungario
Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения, AdE[1]
Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet u Kragujevcu
Balázs Wacha, Hungario, MTA Nyelvtudományi Intézet

[1] AdE – Akademio de Esperanto

Sur la titolpaĝo:
Ĉe la monumento „La venkinto” – Vizito de niaj kongresanoj al la parko Kalemegdan (vd. la kongresan raporton de Aranka LASLO sur la paĝoj 4-7.)

Enkonduko

Karaj legantoj,

Ĉu artefarita intelekto povas vere helpi al ni instrui lingvojn kaj pensi interkulture pri edukado? Tiu demando estis la ĉefa fadeno de nia ĉi-jara ILEI-Kongreso, kies temo estis *AI kaj lingvoinstruado*, dum nia ILEI-Simpozio speciale dediĉiĝis al *AI kaj kulturo*. Ambaŭ aranĝoj montris, kiom aktualaj estas tiuj demandoj en nia AI-eca tempo.
Dum la programeroj oni ofte reliefigis la duoblan flankon de AI: ĝi povas esti rimedo por plirapidigi lernadon, malfermi pordojn al altnivela tradukado, tutmonda kunlaboro kaj kultura interkompreniĝo, sed samtempe ĝi povas porti riskojn, se ne saĝe gvidata. La diskutoj klare montris, ke necesas homa respondeco por la direkto, kiun la teknologio alprenos.
Speciala momento estis la voĉlegado de nia *Kongresa Rezolucio* per AI dum la Fermo de la Kongreso. Kiam ni volis tion realigi, mi konstatis – same kiel jam dum mia unua E-kurso por nevidantoj – ke bedaŭrinde ankoraŭ ne ekzistas natursona voĉsintezilo por Esperanto! Ironie, dum la eventoj mi plurfoje atentigis, ke por AI ĝuste nia lingvo estas multe pli facile analizebla kaj sintezebla pro sia reguleco. Tamen por etnaj lingvoj, kun senfinaj malregulaĵoj, jam ekzistas altkvalitaj solvoj: ekzemple NotebookLM de Guglo, funkcianta per Gemini, parolas 70 lingvojn tre nature! Jen do bona okazo kaj por niaj kampanjemuloj kaj por niaj fakuloj en la koncernaj kampoj.
En ĉi tiu numero vi trovos ne nur la tekston de la Rezolucio, sed ankaŭ raportojn, analizojn kaj inspirojn pri la rolo de AI en lingvoinstruado kaj kulturo.

Ahmad Reza MAMDUHI

Raporto pri la ILEI-kongreso en Beogrado

Kun dankesprimo al ĉiuj kontribuintoj al la kongresa programo

Inter la 19-a kaj 26-a de julio okazis la 58-a kongreso de ILEI, en la ĉefurbo de Serbio. Al la hibrida evento aliĝis entute 170 homoj el 26 landoj, la plejparto por ĉeesta partopreno. Bedaŭrinde, pro la neakiro de vizo pli ol 50 burundanoj kaj konganoj ne povis alveturi, kaj pro teknikaj obstakloj tre malmultaj el ili povis rete sekvi la kongreson aŭ prezenti sian planitan prelegon. La kongreson surloke partoprenis ĉ. 80 esperantistoj, se ni ne kalkulas la neesperantistajn kontribuantojn kaj kursanojn.



Solena malfermo de la kongreso

Statistike, dum la ĉi-jara kongreso realiĝis la jenaj programeroj (ni klopodas listigi ankaŭ la organizantojn kaj prelegantojn, sed pro la multnombreco de aktivaj kontribuantoj, ne eblas nomi ĉiujn):

- Dumkongrese okazis **14 prelegoj**, el tio **5 rilatis al la kongresa ĉeftemo „AI kaj lingvolernado”** (kronologie listigitaj) – fare de Samir RIBIĆ (Bosnio kaj Hercegovino), Laura BRAZZABENI (Italio), Andreas ZERVAS (Grekio), Jérémie SABIYUMVA (Burundo) kaj Aimé-Patrick

MANIRAKIZA (Burundo). Same al la ĉeftemo ligiĝis du diskutrondoj: pri kreado de lernomaterialoj per ChatGPT (moderigita de Laura BRAZZABENI) kaj pri AI en instruado (gvidita de Ahmad MAMDUHI);

- **Simpozion „AI kaj Kulturo”** kun 7 prelegoj organizis Alessandra MADELLA (Italio/Ĉinio), kiu gvidis ankaŭ la seminarion „La Fedro de Platono kiel viva fonto de ideoj pri komunikado”;
- La **du Esperanto-kursoj** estis tre popularaj. La kurson por komencantoj, gvidatan de Raia ANDROVSKA (Bulgario), tage averaĝe vizitis 6 komencantoj, entute ĉirkaŭ 10 ĉeestantoj – inkluzive observantojn, asistantojn kaj helpantojn. La Paroligan kurson de Roberto Guido TRESOLDI (Italio) frekventis averaĝe tage 15 kursanoj;
- **Tri atelieroj**: unu lingva – pri Esperanto, de Rob MOERBEEK (Nederlando), unu metodika – de Dejana RAKIĆ kaj Snežana KNEŽEVIĆ (ambaŭ el Serbio), kaj unu danca, gvidata de Hyonsuk LI (Jesa) kun grupo de koreinoj;
- **Du libroprezentoj** – de Ranja ZAFINIFOTSY (Madagaskaro) kaj Ulrich MATTHIAS (Germanio), kaj de Nedeljka LOŽAJIĆ (Serbio);
- **Ĉeesta ludo** – Rianne SANDERS kaj Ronald VAN BUUREN (Nederlando).



Ekskurso al la regiono Resava - ĉe la akvofalo Veliki Buk („Granda Bruo”)

Ekskursoj kaj la karavano al la UK en Brno:

- Du duontagaj ekskursoj: promenekskurso (urbocentro kaj Kalemegdan, ĉiĉeronis Alan BATUŠIĆ) kaj vizito al la Etnografia Muzeo (interpretis Jovan ZARKOVIĆ);
- Tri tuttagaj-ekskursoj (Srem, Resava, Kragujevac-Topola) – danke al Bojan VELIČKOVIĆ kaj al la tradukistoj Nedeljka LOŽAJIĆ kaj Jovan ZARKOVIĆ (LKK-anoj);

- **Lingva festivalo**: prezento de 18 lingvoj, organizita de Vuk MLADENOVIĆ (Serbio) kaj Blanka LASLO (Serbio/Hungario);
- Krom la **Interkona vespero, Bankedo** kaj la **Internacia vespero**, okazis ankaŭ 3 memorindaj **artaj vesperoj**: „Kabaredo pri aĝo kun koncerto" de Saša PILIPOVIĆ (Serbio), koncerto de Nedeljka LOŽAJIĆ, Uroš MARTINOVIĆ (Serbio) kaj Birke DOCKHORN (Germanio) kaj la Nacia vespero dum kiu prezentiĝis junaj lokaj artistoj: kantista kaj folklora grupoj;
- **Solenaj Malfermo** kaj **Fermo**.

Krom la 8-membra LKK (Laura Brazzabeni, Aranka Laslo, Radojica Petrović, Jovan Zarković, Nedeljka Ložajić, Danijela Petrović, Saša Pilipović kaj Bojan Veličković), la kongreson organizis kaj realigis ankaŭ kelkaj partatempaj **volontuloj** (akceptejo, libroservo, fotado kaj aliaj organizaj taskoj): Tijana Ugarković, Kristina Ilić, Sofija Đenđinović, Blanka Laslo kaj Endre Szászi, kaj ankaŭ Senka Musin, kiel tuttempa helpanto. Granda danko ankaŭ al Ahmad MAMDUHI, prezidanto de ILEI, pro la plentempa kunlaboro kaj gvidado de la hibrida parto, samkiel pro la disponigo de Zoom-o de la Irana Esperanto-Asocio (IrEA). Por la kongreso Zoom-on disponigis ankaŭ la Itala Instituto de Esperanto (IIE), kiu krome ebligis al tri homoj partopreni la ILEI-kongreson pere de la Erasmus-projekto KA1.

Gravas mencii kaj laŭdi la fonan kontribuon de du junuloj: Emese KOVÁCS PÉCSKAI (Serbio) – pentroartistino, la dezajnistino de la kongresa emblemo, kaj Lorenzo TRIANI – programisto – neesperantisto, la kreinto de la kongresa retejo en la lastaj jaroj.

Fine, sed ne malpli grave, ni emfazas la **inkluzivecon** de la kongreso (pro la aktiva partopreno kaj kontribuo de kelkaj nevidantoj) kaj ankaŭ **malfermitecon** de la kongreso al la neesperantista mondo per:

- simpozio kun neesperantistaj fakaj prelegantoj,
- metodika ateliero gvidita de neesperantista fakulino,
- neesperantistaj volontuloj,
- kongresa star-afiŝo ĉe la ĉefenirejo de la kongresejo (hotelo Palace),
- baza kurso de Esperanto, senpaga por neesperantistoj, antaŭe anoncita serblingve tra la sociaj retoj kaj
- nacilingvaj radio-intervjuoj kaj retaj raportoj pri la kongreso (serbe kaj hungare).



Fermo de la kongreso - unu el la multaj hibridaj sesioj

Ni esperas ke, malgraŭ la malfacilaĵoj, la partoprenantoj – kaj la ĉeestaj kaj la virtualaj – estis tamen kontentaj, kaj se iu maltrafis iun programparton aŭ deziras re-spekti ĝin/ilin, la Jutuba kanalo de ILEI (https://www.youtube.com/@EsperantoEdukadoILEI) disponigas la registraĵojn de la hibridaj programeroj. Krom tio, diversaj kongresaj gustumadoj troviĝas ankaŭ en la Jutuba kanalo de EsperRadio – La Frateca Radio, kiu okupiĝas pri eventoj tra la mondo.

Nome de la LKK, Aranka LASLO

IPR 2025/3➢7

Impresoj pri la ILEI-kongreso – Beogrado 2025

Miora RAVELOHARISON (Madagaskaro/Svislando):

Mi dankas Dion, ke mi povis ĉeesti la 58-an ILEI-Kongreson en Beogrado. Ĝi estis mojosa renkontiĝo por kundividi diversajn spertojn. Bone organizitaj programoj estis proponitaj al la partoprenantoj. Mi povis sciigi niajn Malagasajn agadon kaj instruadon, interŝanĝi ideojn kaj renkonti multajn instruistojn. Ĉi tiuj interŝanĝoj estas esencaj en la edukado.

Andreas ZERVAS (Grekio):

Estis mia unua aktiva partopreno en ILEI-kongreso, kaj ĝi fariĝis por mi tre valora sperto. La programo donis al mi la okazon prezenti miajn spertojn pri la uzo de ChatGPT en kursoj de Esperanto por grekparolantoj, kaj ankaŭ enkonduki la grekan lingvon dum la Lingvo-Festivalo. Malgraŭ la komencaj emocio kaj streĉo, la varma etoso kaj subteno de la organizantoj kaj ĉeestantoj helpis, ke ĉio fluu glate. Mi aparte aprezis la altan nivelon de la organizado, la flekseblecon fronte al neatenditaj ŝanĝoj, kaj la bone preparitajn ekskursojn al Novi Sad kaj Topola. La bankedo, plena je muziko, amikeco kaj inspiro, restos neforgesebla. Mi forlasis Beogradon kun la espero denove partopreni en similaj aranĝoj estonte.

Carlos Eduardo de OLIVEIRA (Argentino):

Por mi estis granda ĝojo, por la dua fojo, partopreni en ILEI-kongreso. La unua okazis pasintjare en Brazilo. Ĉiam estas bone koni novajn homojn, fari kontaktojn kun aliaj instruistoj – ĉu de Esperanto, ĉu de aliaj lingvoj – kaj en nia kongreso tio okazis. Inter diversaj programeroj, ni povis gustumi interesan prelegon pri la uzado de IA por krei ekzercojn por Esperanta klaso. Sed en kongreso oni ne nur spektas: oni ankaŭ povas aktive partopreni. Tial mi kontribuis al la programo pere de la prelego 'Ĉu eblas lerni lingvojn per ludoj?', kiu traktis la ludigon de lingvolernado.

Nedeljka LOŽAJIĆ (Serbio):

Ĉi-jare mi la unuan fojon partoprenis en ILEI-Kongreso kaj mi eĉ estis membro de la LKK. Tio estis por mi grava sperto. Mi multon lernis kaj la etoso estis agrabla. Mi, kiel membro de LKK, scias ke ne ĉio iris glate, sed

ni klopodis tuj reagi kaj solvi aperintajn problemojn. La programo estis abunda kaj mi kredas, ke ĉiu partopreninto povis trovi por si interesan kaj utilan programeron. Mi precipe ĝojas, ke en la Kongreso partoprenis novaj, junaj esperantistoj. Mi tre bedaŭras, ke pluraj aliĝintoj el Afriko ne sukcesis ricevi vizon por ĝui la eventon. Kongresoj de ILEI certe povas kontribui al progreso de nia Movado kaj ni klopodu aktive partopreni en ilia organizado.

Simpozio de ILEI 2025

„Artefarita intelekto kaj kulturo”

Enkonduko:

La Simpozio de ILEI ideale estas forumo por faciligi la diskuton ankaŭ inter esperantistaj kaj ne-esperantistaj universitatanoj. Ĉi jaron, laŭ la organizado kaj reĝisorado de Alessandra Madella, ni estis bonŝancaj havi la partoprenon de tre altnivelaj fakuloj el Bosnio, Ĉinio, Hispanio, Japanio, Usono, kiuj diskutis kun ni diversajn aspektojn de la rilato inter Artefarita Intelekto kaj kulturo: de arto al filozofio, de inĝenierio al psikologio, de komunikaj studoj al tradukado kaj sociologio. Fine partoprenis kaj salutis en Esperanto ankaŭ John Durham Peters, distingita profesoro pri Komunikilaj Studoj ĉe Universitato Yale. La ludlisto de la prelegoj kaj diskutoj, en la angla kaj Esperanto, spekteblas en la kanalo „Esperanto + Edukado ILEI” ĉe Jutubo: https://www.youtube.com/watch?v=1BPrBUXBoX4&list=PLufbtAhDHic0B28alWAeQ9QZacsW-NdPZ .

Ĉi tie ni legas tre mallonge pri la prelegenhavoj kaj la prelegantoj mem de la Simpozio:

****

La Ambasado Macartney al Ĉinio kaj la historia reprezentado pere de arto generita de AI

La Ambasado Macartney al Ĉinio en 1793 markis pivotan momenton el la historio de frua moderna diplomatio, trans-kultura interŝanĝo kaj imperia imago. Kiel la unua brita misio al la kortego Qing, ĝi lasis malantaŭ si riĉan vidan kaj tekstan arĥivon, kiu formis la okcidentajn perceptojn pri Ĉinio kaj malkaŝis la kompleksecojn de interkultura negocado. Hodiaŭ, kun la alveno de artefarita intelekto kaj generipovaj teknologioj, artistoj kaj historiistoj

havas novajn ilojn por reimagi kaj reinterpreti tiajn historiajn renkontojn. Tiu ĉi projekto esploras kiel arto generita de artefarita intelekto povas esti uzata por vidigi, kritiki aŭ rekonstrui la kulturajn kaj politikajn dimensiojn de la Ambasado Macartney. Kunmetante historiajn registraĵojn kun maŝin-lernaj teknikoj, ĝi esploras la potencialon kaj la limojn de AI en la reprezentado de kuntekstaj rakontoj, vidaj memoroj kaj tutmondaj renkontoj de la dek oka jarcento.



Pri la preleganto:

Shanshan Chen doktoriĝis pri arthistorio ĉe la Universitato de Hongkongo kaj estas nun vicprofesoro pri arthistorio ĉe la Shandong-a Universitato de Artoj. Ŝi postbakalaŭre studis ĉe la Universitato de Iowa kaj Universitato Princeton. Ŝian esploradon subtenis prestiĝaj premioj, inkluzive de la memoriga stipendio Frank Jewett Mather Jr. de Universitato Princeton kaj esplor-stipendio kune donita de Fondaĵo Getty kaj la Arĥivo pri Azia Arto en Hongkongo. D-ro Chen verkis plurajn gravajn publikaĵojn, inkluzive de angla kaj ĉina monografioj pri la Ambasado Macartney en Ĉinio. Ĉe la Shandong-a Universitato de Artoj, ŝi starigis la Esplorcentron por Ĉin-Okcidenta Art-interŝanĝo kaj Cifereca Krea Kulturo, krom la Pens-fabrikon por la Internacia Komunikado de Ĉina Kultura Heredaĵo, tiel antaŭenigante interfakan kaj trans-kulturan esploradon.

****

La sociala imago de AI

Ĉar Deepseek abrupte eniris publikan videblecon dum la longa Printempfesta libertempo en Ĉinio, AI iĝis la plej ofta temo en la ĉefaj amaskomunikiloj, sociaj retejoj kaj babiladoj dum familiaj renkontiĝoj kaj festoj de ordinaraj civitanoj. La grado kaj amplekso, per kiuj AI kaptis la publikan imagon estas senprecedencaj. En mia prelego, mi volas resumi kaj priskribi diversajn tipologiojn de sociaj imagoj de AI en la nuntempa Ĉinio, bazante min sur komencaj observadoj de diversaj komunikaj kanaloj. La tipologioj inkluzivas tekno-naciistajn diskursojn, la rolon de AI en la farado de gravaj, kritikaj decidoj, la similecon kaj malsimilecon de AI kompare kun individuaj homoj kaj la diskutojn pri AI kiel la nova laborforto. Sociaj imagoj finfine influas kaj formas la manieron, en kiu novaj teknologioj integriĝas en

la socian organizadon kaj la socian vivon, tial gravas por ni kompreni la profundajn zorgojn de la civitanoj pri AI kiel la plej grava nov-epoka teknologio.

Pri la preleganto:



D-ino Wu Jing estas profesoro pri komunikado ĉe la Departemento de Ĵurnalismo kaj Komunikado de la Pekina Universitato. Ŝi doktoriĝis pri Komunikado ĉe la Departemento de Komunikaj Studoj de la Universitato de Iowa. Ŝiaj esplorareoj estas kritikaj komunikilaj kaj kulturaj studoj, sociaj teorioj de komunikado kaj komunikila teknologio, sociaj uzoj de novaj komunikiloj, kreaj industrioj, vida kulturo ktp. Ŝi publikigis eseojn en la ĉina kaj en la angla pri temoj koncernantaj plurajn aspektojn de komunikiloj, kulturo kaj socio. Ŝiaj lastatempaj esplor-interesoj fokusiĝas pri sociaj uzoj, historio kaj sociaj teorioj de novaj komunikilaj teknologioj, precipe vidaj komunikiloj kaj la interreto.

****

„AI: Kiel tio funkcias?"

Dum la evoluo de komputiloj, la koncepto de artefarita intelekto ĉiam ŝajnis io en tuja, tamen malproksima estonteco. Kiel komputilo plenumas intelektajn taskojn, de simplaj aritmetikaj operacioj ĝis hodiaŭaj Grand-Lingvaj Modeloj? Kiel okazas, ke ĉiufoje kiam ni komprenas la bazan funkcian principon de nova komputila atingo, ni ĉesas admiri ĝin kaj ĉesas nomi ĝin artefarita intelekto? Per persona sperto, ni transiros de konektado de dratoj, tra logikaj cirkvitoj, konstruado de makroprocesoroj, la principoj de ŝako, simbola matematiko, optika teksto-rekono, neŭtralaj retoj, la programo ChatGPT, al cerbaj simuladoj en la malproksima estonteco. La prelego estas ankaŭ subtitolita en Esperanto.



Pri la preleganto:

Profesoro D-ro Samir Ribić (1968) estas plena profesoro ĉe la Fakultato de Elektrotekniko en Sarajevo, instruanta la fakojn Operaciumoj, Sistemprogramado kaj Programlingvoj kaj tradukiloj. Li okupiĝis pri komputiko kaj informadiko dum pli ol 40 jaroj, laborante unue kiel programisto kaj teknika direktoro, kaj poste kiel asistanto


kaj profesoro ĉe la fakultato. Samir estas doktoro pri sciencoj en la kampo de efektivigo de programlingvoj. Li publikigis 26 sciencajn artikolojn, ĉirkaŭ 60 profesiajn artikolojn kaj tri librojn. Li estas membro de la IEEF, la Teknika Komitato por IT-Normigado kaj Universala Esperanto Asocio.

****

„La malfacila rilato inter la Homa stulteco kaj la Artefarita intelekto”

Ni komencos la aferon proksimiĝante el la popola kaj literatura aliroj al la stulteco kaj klopodos skizi ĝiajn trajtojn pere de scienca aliro. Kompreninte la enhavon kaj potencon de la koncepto, ni tuŝos kelkajn rilatojn inter ĝi kaj AI.

Pri la preleganto:




Viko (Vicente Manzano-Arrondo) estas profesoro pri esplorado de la homa konduto en la Universitato de Seviljo, Hispanujo, kaj respondeculo pri Sciencigo en la Universitato de la Espero en Baraka, DR Kongo. Li kunrealigas la entreprenon Civiencia, kies oficialaj du lingvoj estas la hispana kaj Esperanto. Lia esplorfako estas la subpremado kaj ĝiaj branĉoj. Unu el tiuj branĉoj estas la scienca esploro de la stulteco.

****

AI aktiva en fervorula arto pri pop-kulturo

Artefarita Intelekto, precipe generipova AI, estas uzata pli kaj pli ofte por fervorula arto, kiel derivitaj romanoj kaj videoj pri pop-kulturo. En mia prelego, mi montros la ecojn kaj la problemojn de la uzado de generipova AI por fervorula arto.

Pri la preleganto:



Du Xin magistriĝis pri Japanaj Kulturaj Studoj ĉe la Pekina Universitato (Ĉinio) kaj pri Soci-psikologio ĉe la Keio-Universitato (Japanio), kie ŝi ankaŭ doktoriĝis pri Sociologio. Ŝiaj ĉefaj esplorkampoj estas Internaciaj komparaj studoj pri socia konscio kaj junulara

sociologio (la perspektivo de la junaj generacioj pri vivo kaj laboro, popkulturo).

Ŝia disertacio iĝis la (japanlingva) libro titolita *Internacia komparo de junulara laborkonscio en moderna socio: Kvalita esploro fokusiĝanta pri altedukitaj homoj en Japanio kaj Ĉinio*. Ŝi havas la japanan altnivelan kvalifikon de „Profesia Socia Esploristo" kaj estis estrarano de la Ĉina Esplora Societo pri Sociaj Sciencoj, la plej granda kaj longtempa organizo de ĉinaj universitatanoj loĝantaj en Japanio. Ŝi laboras kiel ĵurnalisto kaj instruas ĉe la Keio-Universitato.

****

Generipova AI kaj traduka praktiko

Tre simile al la onidiro pri tio kiel Ivan Turgenev karakterizis siajn rakontojn kiel romanojn (ruse: *romany*), kiam la publiko bonvenigis ilin, sed nur kiel rakontojn (ruse: *povesti*), kiam ili fiaskis, tradukistoj ja emas ŝanĝi la teorian grundon sub la piedoj laŭ la kritiko aŭ aprobo, kiun ili ricevas - kiam leganto ŝatas ilian verkon, ili abunde substrekas la kreajn malfacilaĵojn de la teksto; kiam okazas la malo, ofte la tuto iĝas „nur tio, kion la aŭtoro verkis." Krome, en la komercaj kaj kritikaj kampoj, kontraste al la tendenco konsumi dungitajn tradukojn sendepende de tia ilia eco aŭ eĉ sen konscii pri ĝi, oni ofte celebras kiel elstaran atingon la tradukon de teksto kiel tre formala poemo, kies traduko aperas malfacila aŭ „malebla." En la lasta okazo, tradukado estas konsiderata senkompare kreiva ago, dum en la unua ĝi ŝajnas eĉ ne menciinda pro sia troa meĥanikeco. Tiu Jana eco de tradukado – sentata kelkfoje nur meĥanika kaj alifoje tre kreiva – emas meti sian rilaton kun generipova AI en sian propran kategorion, precipe kiam la aliro ŝanĝiĝas, kiel en la analogio de Turgenev, laŭ la perceptata bonvenigo de la teksto fare de la publiko. En mia prelego, mi esploros tiun ĉi demandon kaj aliajn, kiujn generipova AI kolorigas en sia aparta maniero, precipe kiam precizeco kaj kreiveco staras sur nestabila grundo.

Pri la preleganto:

Russell Scott Valentino estas profesoro en la Departemento de Slavaj kaj Orient-Eŭropaj Lingvoj kaj Kulturoj kaj en la Departemento de Komparaj Literaturoj ĉe la Indiana Universitato Bloomington. Liaj verkoj estis publikigitaj de NY Times, Reaktion Books, The Harvard Review, Yale University Press, kaj po dekduo da aliaj literaturaj revuoj kaj eldonistoj; ili

ricevis subtenon de NEH, NEA, PEN American kaj la Usona Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj kaj Edukado. Iama ĉefredaktoro de Iowa Review kaj iama Prezidanto de la Usona Asocio de Literaturaj Tradukistoj (ALTA), Valentino servis kiel ĵuriano por la eldono 2022 de National Book Awards (Naciaj Libro-Premioj). Li estas la fondinto kaj la eldonisto de



Autumn Hill Books kaj blogas ĉe russellv.com. Lia traduko Kin (Archipelago Books, 2021) de la familia sagao de Miljenko Jergović ricevis la premion 2023 por la Plej Elstara Proza Traduko de la Usona Asocio de Instruistoj de Slavaj kaj Orient-Eŭropaj Lingvoj. Lia traduko (kun Miriam Shrager kaj Sibelan Forrester) de *Historical Roots of the Wondertale de Vladimir Propp* (Historiaj Radikoj de la Mirrakonto de Vladimir Propp) aperos en Septembro 2025 ĉe Indiana University Press. Li estas nuntempe la ricevanto de la stipendio Fulbright por universitataj agadoj ligitaj al la Universitato de Zadar.

****

Artefarita Intelekto en Arto kaj kosmoteknikoj de Yuk Hui

Yuk Hui estas filozofo, kiu instruas ĉe la City University de Hong Kong. Li famas pro sia libro The Question Concerning Technology in China (La demando koncerne teknologion en Ĉinio, 2016), kie li argumentas, ke ni devus aldoni al la pivota eseo de Martin Heidegger „Die Frage nach der Technik" (La demando pri teknologio, 1953) la remalkovron kaj la interrilaton de diversaj kosmoteknikoj. Tiuj kolektivaj estetikaj spertoj kaj pensoj pri teknologio de malsamaj epokoj kaj lokoj povas efektive helpi nin rezisti kontraŭ la forgeso de la Esto kaŭzita de la universaligo de okcidenta teknologio kiel Gestell, aŭ „enframigo", kiu reduktas homojn, ne-homojn kaj naturon al ekspluatebla, ĉiam-preta rezervaĵo. En sia pli freŝdata libro *Art and Cosmotechnics* (Arto kaj kosmoteknikoj, 2021), Hui pritraktas pli profunde la problemon de estetiko en ĝiaj rilatoj kun teknologio. Mi argumentas, ke la demandoj, kiujn li faras en sia verko pri la rilato inter arto, teknologio kaj filozofio, provizas nin per interesaj pensoj pri la ebla disvolvo de malpli limigita AI. Artefarita intelekto iĝis granda produktanto de estetikaj objektoj, eĉ vendataj ĉe grandaj aŭkciejoj. Sed, preter la ekscitiĝo de la merkato kaj la blinda konkurado de teknologiaj progresoj, kiel artefarita

intelekto povas vastigi la eblojn de arto kaj kiel arto povas reciproke subteni la progreson de teknologio en manieroj ankoraŭ ne antaŭvideblaj? Kiel arto kaj moderna teknologio povas helpi nin elpensi novan komencon por filozofio post la fino de la Okcidenta metafiziko laŭ Heidegger aŭ post la postmoderno, ankoraŭ tro bazita sur Okcidenta moderneco?

Pri la preleganto:



Alessandra Madella studis Japanan Literaturon ĉe la Universitato Ca' Foscari de Venecio kaj la Universitato de Tokio. Ŝi doktoriĝis pri Komunikaj Studoj (Retoriko) ĉe la Universitato de Iowa en Usono per disertacio pri la retoriko de teknologio en la franca-japana filmo *Hiroshima mon amour* (Hiroŝimo mia amo, https://ir.uiowa.edu/etd/1245/). Ŝi instruis Mondan Kinhistorion kaj Esperanton ĉe la Artkolegio de Kunming kaj estas nun profesorino de la Esperanta fako ĉe la Zaozhuang-a Universitato en Ĉinio. Ŝi estas la nuna vic-prezidanto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), aŭtoris la libron *Esperanto: Facile lernebla kaj helpo en la studo de aliaj lingvoj* (Edistudio, 2023, tradukita en la itala kaj en la kroata) kaj redaktis la *Aktojn de la Simpozioj de ILEI 2022-23* (Edistudio, 2024).

Pri la respondanto:



David J. Depew estas Emerita Profesoro ĉe la Universitato de Iowa. Li instruis historion de filozofio kaj historion de retoriko. Lia esplorado fokusiĝas sur historio, filozofio kaj retoriko pri evoluisma biologio. Li kunverkis tri librojn pri la temo, plej freŝe *Darwinism, Democracy and Race: American Anthropology and Evolutionary Biology in the Twentieth Century* (Darvinismo, demokratio kaj raso: Usona antropologio kaj evoluisma biologio en la dudeka jarcento) kun John P. Jackson (Routledge, 2017).

REZOLUCIO DE LA 58-A KONGRESO DE ILEI

La Rezolucio de la 58-a Kongreso de ILEI (2025, Beogrado, Serbio), kies tekston vi vidas ĉi tie, estis verkita kaj aprobita dum la Kongreso. La AI-voĉlegado, kiun oni aŭskultis dum la **Fermo de la Kongreso**, estis realigita per la aplikaĵo **Parol** (parol.martinrue.com), danke al **Hamzeh Shafiee**, kaj la muntado de la video per **AI Canva**, danke al **Laura Brazzabeni**.

Spektu la videon ĉi tie:
https://www.youtube.com/watch?v=oADkwJ-_ao8&list=PLufbtAhDHic2srkHxpzDPKyGBajEXmQdF&index=12

Ĉeftemo: Lingvolernado kaj Artefarita Intelekto

La 58-a Internacia Kongreso de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kunveninta en Beogrado (Serbio) de la 19-a ĝis la 26- a de julio 2025, dediĉis sian semajnon al la temo „**Lingvolernado kaj Artefarita Intelekto**". Kadre de la kongreso okazis ankaŭ universitata ILEI-Simpozio sub la titolo „**AI kaj Kulturo**".

Konsiderante ke:

• Artefarita intelekto (AI) rapide transformas la metodojn de lingvolernado kaj instruado, kunportante novajn eblojn kaj defiojn;

• Esperanto, kiel planlingvo kun logika kaj regula strukturo, havas unikajn trajtojn kiuj povas bone kongrui kun AI-iloj por lernado kaj tradukado;

• Estas esence esplori kiel AI povas subteni kaj plibonigi la instruadon kaj disvastigon de Esperanto, samtempe konservante la kulturajn kaj interhomajn aspektojn de lingvolernado;

• La simpozio „AI kaj Kulturo" emfazis la gravecon de etikaj, sociaj kaj kulturaj konsideroj en la apliko de AI, ankaŭ en la kunteksto de tradukado kaj arta kreado;

La Internacia Kongreso de ILEI rezolucias:

• **Subteni esploradon kaj evoluigon de AI-rimedoj por Esperanto**: Instigi al evoluo de aplikaĵoj/apoj, platformoj kaj rimedoj bazitaj sur AI (ekz.

babilrobotoj, virtualaj instruistoj, gramatikanaliziloj kaj progresintaj neŭraj tradukiloj) por faciligi la lernadon, ekzercadon kaj uzadon de Esperanto.

• **Enkonduki AI en metodikon por instruado de Esperanto**: Esplori kaj kundividi bonajn praktikojn por la uzo de AI en lernado kaj instruado de Esperanto, rigardante ĝin kiel komplementan, ne anstataŭantan, al la homa interago kaj tradicia pedagogio.

• **Krei lernomaterialojn utiligantajn AI-teknologion**: Disvolvi kaj disvastigi novigajn edukrimedojn kiuj enplektas AI-teknologion por fari la lernadon de Esperanto pli interaktiva, tajlorita kaj efika.

• **Sentemigi onin pri etika kaj respondeca uzo de AI**: Stimuli kritikan pensadon pri la efikoj de AI en lingvolernado kaj kulturo, certigante ĝian uzon inkluzivan, justan kaj respektan al lingva kaj kultura diverseco.

• **Flegi kunlaboron inter esperantistoj kaj AI-fakuloj**: Instigi al interŝanĝo de scioj kaj spertoj inter la esperantista komunumo, esploristoj, sciencistoj kaj programistoj en la kampo de artefarita intelekto, por utiligi la sinergion inter Esperanto kaj novaj teknologioj.

• **Apogi la trejnadon de instruistoj pri AI**: Proponi daŭrajn trejnadojn por instruistoj de Esperanto, por ke ili povu efike kompreni kaj uzi AI-rimedojn en sia instruado.

Raporto pri la 110-a UK en Brno

de Alessandra MADELLA (Italio)

La 110-a UK en Brno estis tre bone organizita, kun interesaj programeroj, sed ankaŭ kun multe da ŝancoj por renkonti homojn kaj trankvile paroli. Dum la Movada Foiro, ILEI dividis tablon kun la Komisiono de UEA por „Virina Agado”. Mi povis beligi nian flankon per niaj belaj revuoj IPR kaj JA. Nia kasistino Karine Arakeljan kaj Stano Marĉek ĝustatempe alvenigis el Slovakio kvar skatolojn da ili, kiujn homoj volonte prenis ankaŭ dum la Prezento de la fakaj asocioj kaj la Prezento de ILEI, pri kiuj zorgis respektive Aristophio Andrade Alves Filho kaj mi. Fine de la semajno, el la 1 200 revuoj tiucele senditaj, restis nur 200, kiujn ni kunportis al Italio por disdonigo dum la Itala Kongreso. Mi ankaŭ donis la libron *Aktoj de la Simpozioj de ILEI*

2022-23 al niaj ĉeestantaj sekciestroj kaj komitatanoj, kiel ni decidis fari por festi la 75-jariĝon de nia Ligo.



Dimanĉon mi havis la honoron reprezenti ILEI, sidante surpodie kaj salutante dum la Malferma Ceremonio. Kvankam en la nova estraro de UEA ne plu estos la longdaŭraj ILEI-anoj Duncan Charters kaj Aurora Bute, restos Arko (Gong Xiaofeng) kaj François Lo Jacomo kaj eniris ĝin ankaŭ nia juna sekciestrino de Madagaskaro, Miora Raveloharison. Do, la rilatoj kun ILEI restos fortaj kaj en mia mallonga parolado mi aparte substrekis ilian gravecon en la kampo de lernejoj kaj universitatoj. La nova prezidanto de UEA, Fernando Maja Jr., montris sian kunlaboremon interalie partoprenante en preskaŭ la tuta Tago de Lernado, kiu estis kiel kutime majstre organizita de Marija Belošević, ĉi-fojon speciale ankaŭ kiel AMO-seminario. La tre bunta programo iris de la feministaj podkastoj de Stela Besenyei-Merger por Radikala Tenero al la biblioteko de Vieno, de la prezentado de la ĉeĥa lerneja sistemo al kontribuoj pri artefarita intelekto fare de Duncan Charters kaj Ahmad Reza Mamduhi, sen forgesi prezentojn pri Afriko kaj Ĉinio. Mi mem prelegis pri mia kurso „Kernaj konceptoj de komunikado", kiun mi adaptis de la angla „Core Concepts of Communication", disvolvita dum jaroj de John Durham Peters ĉe la Universitato de Iowa en Usono, por instrui ĝin al la studentoj de la Esperanta fako de la Zaozhuang-a Universitato.

Mirejo kaj Fernando Maja parolis respektive pri interkulturaj „pontoj" kaj la potenco de kunlaboro. Specife, la prelego de Mirejo. kiu enkondukis la Tagon de Lernado, havis kiel titolon „Ĉu ĉiuj esperantistoj estas efikaj 'pontoj'?" Ŝi klarigis pri la interkulturaj rilatoj inter esperantistoj kaj montris, ke kelkaj personoj bone konas sian kulturon, havas pozitivan rilaton al ĝi, ni

ne diru „fieras pri ĝi”, kaj havas emon kaj kapablon bone prezenti ĝin al eksterlandaj gastoj. Tiajn komunikemajn personojn Mirejo nomas „pontoj”. Laŭ propono de Mirejo, Fernando kaj ŝi tuj donis vidan ekzemplon de tiu „ponta” sinteno per ekzerco, kiu ebligas sperti konfidon. Ili vokis la organizonton de la UK de Graz, Ewald Schick, kaj petis lin balanciĝi inter ili kun fermitaj okuloj, tute fidante je la venanta subteno. Kvankam la LKK-anoj de Graz estas tre motivitaj kaj laboremaj, certe pli da konfido ĉiam bonvenas antaŭ tia granda tasko kiel organizi Universalan Kongreson.



Grupa foto je la fino de la Esperantologia Konferenco

Bedaŭrinde pro horaj konfliktoj mi devis kontentiĝi pri la bela IKU-libro por la Internacia Kongresa Universitato, organizita de Amri Wandel kun Věra Barandovská-Frank kiel rektoro. Sed mi plene ĝuis la Esperantologian Konferencon organizitan de Klaus Schubert kaj Bengt-Arne Wickström por la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). La klasĉambro plenplenis por la prelegoj de Stela pri Esperanto en familioj kaj de Ilona Koutny pri tio ĉu plurlingvismo necesas en la epoko de AI. En mia sekcio pri propedeŭtiko, tre interesa estis la kontribuo de Ekaterina V. Bebenina, kiu studis kun Helmar Frank kaj tre precize raportis pri lia penso pri transferoj. Ŝi argumentis, ke en la 70-aj jaroj propedeŭtiko ne estis oficiale rekonita kiel strategia, ĉar la sistemo estis tiam direktita al la enhava transdono de scioj. Sed ĝi povus havi pli da ŝanco nun, kiam la nova

edukpolitiko pli valorigas la kapablon lerni, adapteblon kaj interkulturan perceptemon. Mia kontribuo estis iom da arkeologio de tiu ĉi prelego. Ĝi montris la eksperimentojn pri Esperanto de Edward L. Thorndike kaj Helen S. Eaton en la Usono de la tridekaj jaroj en la kunteksto de tiamaj diskursoj pri edukado, kiuj vidis la transiron de filozofia fokuso pri mensa disciplino al la scienca fokuso pri apartaj transferoj. Inter la aliaj gravaj kaj kleraj kontribuoj, memorinda estis la prelego de Humphrey Tonkin pri la estonteco de Interlingvistiko, kiu alvokis al pli da konscio pri la ŝanĝiĝanta monda situacio kaj pri la novaj ebloj, kiujn espereble ĝi povos malfermi por Esperanto. La konferenco finiĝis per diskutado pri la estonteco de Esperantologio, post la fermo de la studoj ĉe la Universitato de Poznano.



Instruistoj brilis ankaŭ en la uzo de Esperanto por praktikaj celoj, de la nova Faka Angulo lanĉita de Katalin Kováts, al la 3-dimensia desegnado de Mónika Molnár, al la origamioj de Larysa Osadchuk. Kiel kutime, multe da ILEI-aninoj aktive kontribuis al la programo de „Virina Agado” de UEA. La temoj iris interalie de motiviga filmo de Alexandrine Omba pri „saĝaj” afrikaj virinoj al video de Ma-Ga Filmoj pri la poemoj de la itala poetino Caterina Parca (Giorgia Albertelli), de kantoj pri Esperanto kiel lingvo de paco kaj amikeco al diskutoj kun la publiko pri la rolo de virinoj en diversaj landoj. Eĉ sen konsideri la allogan programon pri la ĉeĥa kulturo, kaj la buntajn kontribuaĵojn de alilandaj artistoj, tiu ĉi estis certe tre kontentiga, engaĝiganta kaj riĉiga kongreso, kiu multon alportis ankaŭ al instruistoj.

Virina Agado

de Mireille GROSJEAN

En la programo aperis du horoj pri Virina Agado. Miora Raveloharison, Alessandra Madella, Mireille Grosjean kaj aliaj gvidis viglan kaj agrablan momenton, kie oni aŭdis kantojn, prelegojn kaj debatojn kaj spektis filmojn pri la situacio de virinoj en la mondo. Poeziaj prezentaĵoj ne mankis: Miora kantis kreaĵon de Luiza Carol kaj la publiko ĝuis la filmon *Floraj Ludoj* kun tekstoj de Caterina Parca kune kun belaj bildoj. Enkonduke venis prezento de la strukturo de la Komisiono pri Virina Agado de UEA kaj ĝiaj pasintaj agadoj. Arko zorgis pri tiu prezento. Mirejo provis skizi la diversajn situaciojn de talentaj virinoj kun aŭ sen edzo, ŝi elektis la titolon „Virinoj en ombro aŭ en lumo". Arko prezentis la evoluon de la virina vivo en Ĉinio kaj Alexandrine Omba, per vigla kaj amuza filmo, sentigis al la publiko la virinan vivon en DR Kongo. Bedaŭrinde Alexandrine same kiel Małgosia Komarnicka ne sukcesis atingi la kongresurbon.

Tago de Lernado

de Marija BELOŠEVIĆ, ĉefkunordiganto de la „Tago de Lernado"

La tradicia kongresprogramero dum la Universala Kongreso, la „Tago de Lernado", ankaŭ ĉi-jare kadre de la 110-a UK proponis aron da tre interesaj prelegoj, kiuj celis trakti kelkajn el la plej gravaj temoj de nia tempo. Tiuj temoj profunde influas edukadon – kaj per tio ankaŭ nian komunan estontecon. Sendube unu el la plej grandaj defioj de nia epoko estas la demando pri paco. La prelegantoj pristudis ĝin el diversaj vidpunktoj, kunligante ĝin kun teknologio, artefarita inteligento, kulturaj interŝanĝoj kaj internacia komunikado sub la komuna temo „Pri la uzo de Esperanto kaj teknologio por pacaj celoj".

Inaŭgurante la programon, la novelektita prezidanto de UEA Fernando Maia Jr. diris, ke „unu el la kialoj, kial mi laboras por Esperanto, estas edukado. Esperanto por mi estas ilo por eduki kaj por esti edukata, kaj precipe por komuniki. Edukado estas ebla nur kun instruistoj, eĉ se ne ĉiam kun la materialoj, kiujn ili preparas, kaj ne nepre kun profesiaj instruistoj, ĉar ne necesas esti profesiulo por instrui kaj por kunhavigi sian scion. Kaj tio estas ankaŭ ia „malsano" – en bona senco – asertis Maia, „ĉar instruistoj mem plifortiĝas per tio, kion ili instruas. Sed tio samtempe estas laboro, ĉar

kiam vi instruas, vi lernas. Jen la mistero de edukado, kiun oni povas sperti, kaj hodiaŭ ni ĝin spertas”.



Bernhard Tuider prelegas dum la Tago de Lernado

Per video-ligilo la partoprenantojn en la UK-salono same bonvenigis la prezidanto de ILEI, Ahmad Mamduhi. Lige al la temo de la „Tago” li asertis, ke ĝi estas ne nur taŭga, sed urĝa, ĉar „ni vivas en epoko de granda teknologia rapideco, kiam AI, ciferecaj komunikiloj, virtualaj platformoj - ĉio ĉi ŝanĝas nian manieron pensi, lerni, instrui, komuniki kaj eĉ konstrui nian identecon. Kaj ĝuste tial la demando leviĝas: Kiel ni, esperantistoj kaj edukantoj, povas uzi tiujn teknologiojn por antaŭenigi ne sole scion, sed ankaŭ komprenon? Ne sole efikecon, sed ankaŭ empation?”

Esperanto, mem frukto de la teknologia kaj humanisma spirito de la 19-a jarcento, fariĝas denove aktuala kiel ilo por interkultura kunlaboro, justa informado kaj paca kunvivado. Se kunligita kun teknologio – uzata respondece kaj kun etika konscio – ĝi povas fariĝi potenca rimedo por lernado trans limoj, por demokratia scidivido kaj por kultura diverseco en mondo minacata de homogenigo kaj konflikto, li aldonis.

„Kiel prezidanto de ILEI, mi fieras pri tiu ĉi aranĝo. Ĝi montras, ke nia rolo kiel edukantoj, lingvistoj kaj homoj de konscienco ne finiĝas en la klasĉambro aŭ en reta kurso, sed etendiĝas al la tutmonda komunumo. Kaj ĝi montras ankaŭ, ke Esperanto daŭre estas viva, dinamika ilo por konstrui ne nur pontojn inter lingvoj, sed ankaŭ inter homoj kaj kulturoj."

Al la programo kontribuis Mireille Grosjean, Svislando, „Ĉu ĉiuj esperantistoj estas efikaj 'pontoj'?", Fernando Maia Jr, Brazilo „La potenco de kunlaboro en edukado por paco kaj konfido", Duncan Charters, Usono „Kiel profiti teknologion por paccelaj kulturaj interŝanĝoj", Bernhard Tuider, Aŭstrio „Diĝitaj dokumentoj el la Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko", Libuše Hýblová, Ĉeĥio „Ĉeĥa eduksistemo", Ahmad Mamduhi, Irano „Esperanto kaj AI: pontoj al la paca mondo", Stela Besenyei-Merger, Hungario „Radikala Tenero - retaj babiladoj por interkultura lernado kaj internacia interkompreniĝo", Alessandra Madella, Italio/Ĉinio „Kernaj Konceptoj de Komunikado" kaj Jérémie Sabiyumva, Burundo „Kontribuo de Esperanto kaj teknologio en informado, kazo de Afriko".

Grava novaĵo por la nuna jaro estas tio, ke la seminario AMO estis okazigita kadre de la Tago de Lernado. La kunfandiĝo kreis veran sinergion: AMO ricevis pli vastan kaj prestiĝan kadron, dum la Tago de Lernado pliriĉiĝis per la spertoj kaj metodikaj aliroj de AMO. Tiel ambaŭ aranĝoj reciproke fortigis unu la alian kaj kune donis novan impulson al la tutviva edukado de esperantistoj. Krome, ankaŭ ĉi-jare, oni povis distance sekvi la prelegojn per ZOOM.

La Vojo de Renato: de praktikaj principoj al kultura esprimado

Verkis: Mireille GROSJEAN kaj Ahmad MAMDUHI

Enkonduko

La Esperanto-Movado, kiu ekzistas jam pli ol cent jarojn, daŭre serĉas novajn vojojn por disvastigi la internacian lingvon kaj kunligi homojn trans kulturaj kaj naciaj limoj. En tiu ĉi artikolo ni esploros praktikajn principojn por efika Esperanto-agado, inspiritajn de la travivitaj spertoj de la

karmemora Prof. Renato Corsetti, kaj ankaŭ rigardos kiel esperantistoj esprimas sian identecon per diversaj simboloj kaj kulturaj referencoj.

La Sep Principoj de „La Vojo" de Renato

Ahmad Reza Mamduhi formulis sep fundamentajn principojn bazitajn sur la spertoj de Prof. Renato Corsetti, unu el la plej influaj figuroj en la moderna Esperanto-Movado:

1. Konekti homojn

La esenco de Esperanto kuŝas en ĝia kapablo unuigi homojn el diversaj kulturoj. La lingvo mem estas nur ilo – la vera valoro troviĝas en la homaj rilatoj, kiujn ĝi ebligas.

2. Agi praktike kaj idealisme

Esperantistoj devas kombini praktikan efikon kun idealisma vizio. Ne sufiĉas nur revi pri mondo sen lingvaj baroj – necesas konkretaj agoj por realigi tiun vizion.

3. Instrui per ekzemplo

„Renato mem agis", kiel emfazas liaj travivitaj spertoj. La plej potenca instruilo estas persona ekzemplo. "Bone montru la vojon kaj ekfaru mem" – tiu ĉi principo substrekas la gravecon de harmonio inter vortoj kaj agoj.

4. Esti malfermita al novaj ideoj

La Esperanto-Movado progresas nur, se ĝi akceptas novigojn kaj adaptiĝas al ŝanĝiĝantaj cirkonstancoj. Malferma menso estas esenca por la daŭra evoluado de la Movado.

5. Inkluzivigi ĉiujn

Esperanto estas lingvo por ĉiuj homoj, sen distingo de deveno, lingvoj, religioj aŭ politikaj kredoj. Inkluziveco ne estas nur idealo, sed praktika neceso por la sukceso de la Movado.

6. Kultivi personajn rilatojn

Malgraŭ la cifereca epoko personaj rilatoj restas la koro de la Esperanto-komunumo. Amikoj kaj konatoj ofte estas la plej bona reklamo por la lingvo. Esperantistoj nutru tiajn rilatojn, kiel oni nutras fajron por ke ĝi daŭre flamu.

7. Subteni junulojn

La estonteco de Esperanto dependas de novaj generacioj. Subteno al junuloj ne nur garantias kontinuecon, sed ankaŭ alportas freŝajn ideojn kaj energion.

Kultura Esprimado: Sumoo kaj Simboloj



Interese, esperantistoj trovadas kuraĝigajn kaj kreemajn vojojn por esprimi sian identecon. La unua bildo montras T-ĉemizon kun la teksto „Mi Legas kaj Venkas, Mi Estas Jokozuna” – fascinanta mikso de Esperanto kun japana sumoo-kulturo.

„Jokozuna” estas la plej alta rango en sumoo-luktado, rezervita nur por la plej elstaraj luktistoj. Uzante tiun terminon, esperantistoj esprimas sian fierecon pri sia persistemo en legado per kultura metaforo, kiu montras, kiel Esperanto povas inkluzivi kaj honori diversajn kulturojn.

La Simbolo de Unuiĝo

La dua bildo prezentas la klasikan Esperanto-simbolon kun la teksto „Ne Flagoj, Sed Agoj”. Tiu ĉi frazo resumas la praktikan filozofion de multaj esperantistoj: malpli da simbolaj gestoj, pli da konkretaj agoj.



„La Vojo” de Renato

„La Vojo” de Renato montras, ke sukcesa Esperanto-agado postulas kombinon de praktika saĝeco kaj idealisma pasio. De personaj rilatoj ĝis kultura kreemo, de inkluziva menso ĝis konkretaj agoj – ĉiu elemento kontribuas al la daŭra kreskado de la internacia lingvo.

Kiel montras la bildoj, esperantistoj ne timas esti kreemaj en siaj esprimoj, ĉu per sumoo-metaforoj ĉu per klara alvoko al agado anstataŭ nura simbolismo. Tiu ĉi dinamika aliro, kombinita kun la sep principoj de „La Vojo” de Renato, prezentas solidajn fundamentojn por la estonta disvolviĝo de la Esperanto-Movado.

La mesaĝo estas klara: Esperanto prosperas, kiam ĝiaj parolantoj ne nur revas, sed ankaŭ agas – konektante homojn, instruante per ekzemplo, kaj kreante komunumon, kiu estas samtempe praktika kaj inspirema.

AI en instruado (*nova rubriko*)

de Françoise NOIREAU (Francio)

Enkonduko pri la nova rubriko: Artefarita Intelekto ebligas rapidan kreon de ekzercoj, adaptadon de materialoj al diversaj niveloj kaj aŭtomatan taksadon, kio signife helpas instruistojn.

La nova rubriko celas prezenti konkretajn ekzemplojn de uzado, kaj gvidliniojn por efika kaj respondeca uzo en la instruado de Esperanto.

Kunteksto de mia instruado: Mi organizas distancan Esperanto-kurson per *WhatsApp*[1] kadre de la Universitato Espero en Kongo (UEC). Tamen, la lernantoj estas en 22 diversaj afrikaj landoj. Por 220 registritaj gelernantoj, necesas 16 geinstruistoj, kiuj volontule instruas en sia(j) klasgrupo(j) kaj taksas la individuajn progresojn. Dufoje jare, okazas parol-ekzameno kun ĵurio de ILEI.

En tiu organiza kaj instrua kunteksto, mi foje bezonas AI por plenumi precizajn kaj postulemajn taskojn aŭ longajn kaj ripetemajn taskojn.

Mi donos ekzemplojn de kelkaj el miaj uzoj, kaj poste donos kelkajn atentigojn pri la instrukcioj, kiujn oni ĝuste kaj detale skribu, por akiri bonan rezulton.

Unua ekzemplo, pri Afriko: Kelkaj el la instruistoj de mia teamo diris al mi, ke ili foje dubas pri la respondoj de iuj studentoj, ĉar ŝajnas, ke ili transdonas la respondojn inter si.

Do mi proponis **krei alternativajn lecionojn**, sed sufiĉe similajn por konservi la uzon de la samaj testoj fine de ĉiu serio de 10 lecionoj. Ĉar mia kurso havas 100 lecionojn, de nivelo A1 ĝis nivelo B2, la tasko estus tempovora kaj teda. Do mi donis tre precizajn instrukciojn al AI, kaj tagon post tago (ĉar mi uzas la senpagajn versiojn de pluraj AI, do mi estas limigita je ĵetonoj), mi povis krei novajn lecionojn enkondukante la samajn gramatikajn nociojn por ĉiu numero de leciono, kaj la saman leksikan

[1] Mi ne subtenas Meta, sed WA estas la plej populara platformo en Afriko.

progreson, tiel ke la numeritaj demandoj de la testoj plu kongruas. Uf, mi ne devis cerbumi dum horoj kaj tagoj!

Dua ekzemplo, pri Afriko: Mi volis aldoni devigan parolan trejnadon en la programon de ĉiu klasgrupo. Do mi petis al AI **krei dialogojn** por ĉiu serio de 10 lecionoj. Tiuj ĉi dialogoj **apliku la gramatikajn konceptojn** instruatajn en ĉiu serio, **reuzante la vortojn** el la koncernaj lecionoj. Poste, mi petis krei mankojn en tiuj dialogoj, celante precipe la vortojn enkondukitajn komence de la lecionoj kaj la gramatikajn instruitajn nociojn. Mi specife petis, ke la troveblaj vortoj estu anstataŭigitaj per tripunkto kaj sekvataj de krampo kun la franca traduko. Kaj jen miaj preparitaj dialogoj, pretaj por homa kontrolo!

Tria ekzemplo, pri Afriko: Por la mastrumado de la klasoj kaj la kontrolo de la individuaj progresoj, mi uzas kalkul-tabelon kun aparta tabel-paĝo por sekvi la progreson de la 220 studentoj registritaj en la Esperanto-kurso de UEC. Mi volis nombri kaj listigi la landojn, kie ili troviĝas. Mi uzis la kolumnon kun la telefonnumeroj de la registritoj, petis al IA **ĉerpi la naciajn telefonajn prefiksojn** kaj **fari alfabetan liston** de la koncernaj landoj, numerante ilin.

AI aŭtomate donis pretan liston – se mi estus farinta tion permane, tio estus tre longa, teda kaj eble kun eraroj.

Kvara ekzemplo, pri *Mensa*: Mi gvidas alian kurson same uzante sociajn retojn, sed kadre de *Mensa*, granda internacia asocio. La grupoj estas heterogenaj (la membroj de la asocio *Mensa* lernas memstare, ili ne bezonas lecionojn kun instruisto). Kadre de *Espermenso* (komencantoj aŭ esperantistaj membroj de la asocio Mensa), mi publikigadas afiŝojn laŭ 3 niveloj. Mi utiligas AI por **adapti ĉiun tekston** aŭ ekzercon **al malsamaj lingvo-niveloj**. AI estas efika ĉefe por kreado de variantoj laŭ postulo. AI jam kapablas taksi la nivelon de ekzerco aŭ krei ekzercon laŭ preciza nivelo.

Kvina ekzemplo, denove pri Afriko: Por parolaj ekzamenoj per *Zoom*, kadre de UEC kaj ILEI: post la forpaso de Renato Corsetti, mi volis esti preta pli aktive partopreni en la ĵurio, preparinte demandojn. Mi petis al AI **kontroli la klasifikon** de miaj ellaboritaj demandoj, laŭ la internacia klasifiko de A1 ĝis C1. Poste, mi petis AI elpensi pliajn demandojn **por ĉiu KER-nivelo**, ke estu abundo. Ne necesas doni ekzemplojn, ĝi jam estas trejnita pri tio.

Konsiloj: Atentu, ke AI estas tradicia, ĉar ĝi utiligas jam ekzistantajn kursojn por generi novajn tekstojn. AI ne vere aplikas la principojn de lingvo-didaktiko, krom se oni eksplicite petas tion. Tial, en la **dekomencaj instrukcioj**, vi postulu realajn *komunikajn situaciojn kun solvinda problemo* (alie, vi ricevos nur dialogojn en kafejo), vi postulu *demando-frazojn kaj negativajn frazojn* (alie, vi ricevos nur jesajn asertajn frazojn) kaj vi insistu pri la *graveco de verboj* (por eviti substantivojn kaj frazojn kiel "La libro estas sur la tablo").


Koncerne **la finan revizion**, kvankam mi petis al AI provlegi kaj strikte kontroli la respondon, ne uzi anglaĵojn, apliki la regulojn de la Fundamento, la rekomendojn de la Aldonoj de AdE, PMEG kaj vortaro.net, bedaŭrinde, la rezultoj similas al tiuj de *Google Translate*: ĉiam restas eraroj, ekz. *praktikka*, aŭ *certa* anstataŭ *iu*, aŭ, pri verboj, tro da pasivaj voĉoj kaj maltro da prezencaj participoj.

AI estas utila ilo, sed ĝia efiko dependas de lerta gvidado. Per precizaj instrukcioj kaj severa kontrolo, eblas ŝpari tempon kaj krei alt-kvalitajn, diversajn materialojn, eĉ per senpagaj versioj. Venos aliaj artikoloj pri tio kiel lerni Esperanton per AI kaj kiel redakti precizajn instrukciojn.

Nun venas via vico: raportu pri viaj provoj, uzoj kaj spertoj!

Françoise NOIREAU,
volontula distanca instruisto ĉe UEC (en DRK) kaj ILEI-ano
desirdapprendre@gmail.com

Gratulo al Mónika MOLNÁR – ricevinto de la Premio Deguĉi 2025



Ne estas oftaĵo, ke unu el niaj plej aktivaj kolegoj ricevas tutmondan rekonon. Tial des pli ĝojas ILEI, kiam nia kara Mónika Molnár, konata pro sia sindonema laboro por infanoj kaj por instruado de Esperanto, estis honorita de UEA per la Premio Onisaburo Deguĉi 2025. Laŭ la tradicio de ĉi tiu premio, oni distingas homojn, kiuj per sia agado en Esperanto helpas konstrui pontojn de paco kaj homa kompreno.
La laboro de Mónika spegulas tion en aparte konkreta maniero: dum jardekoj ŝi enkondukis la lingvon en la ĉiutagon de infanoj, vekante ĉe ili scivolon pri

la mondo kaj klerigante ilin en la spirito de toleremo kaj interpopola amikeco. Por ILEI, la agado de Mónika havas specialan signifon. Ŝi en unu persono kunigis multajn rolojn: instruisto, verkanto, ekzamenanto, ilustranto, redakto-kunlaboranto, organizanto de internaciaj ligoj inter lernejanoj.
Aldone al tio, elstaras ankaŭ ŝia muzika flanko: dum la lastaj jaroj ŝi multe kunlaboris kun la grupo Kajto, kio rezultigis jam kvin belajn kantojn (inter kiuj kvar eĉ kun kaj de ŝiaj gelernantoj). Same signifa estas ŝia fotista kaj filmista agado: danke al ŝi ekestis la muzikfilmeto de la Universala arbo de Kajto (videbla en Jutubo) kaj multaj filmetoj pri infan-prezentaĵoj en Esperanto – plurajn el ili ŝi jam montris dum siaj prelegoj. Tiuj diversflankaj kontribuoj montras, ke ŝia engaĝiĝo al Esperanto ampleksas multajn kampojn de la kulturo kaj eduko.
Ĉiu, kiu konas ŝin, spertis ŝian energion kaj entuziasmon, kiuj inspiras ankaŭ aliajn kolegojn ekster la lerneja kunteksto. Ni ne nur gratulas al Mónika pro la ricevita premio; sed ankaŭ vidas en tio rekonon de la tuta instruista komunumo, kiu per sia persista, ofte ne tiom rimarkata laboro, konstruas la fundamenton de la estonteco de Esperanto.
En la nomo de ĉiuj en ILEI, mi esprimas miajn sincerajn ĝojon kaj fieron. Kara Mónika – viaj atingoj estas ankaŭ instigo por ni ĉiuj.

Ahmad MAMDUHI, Prezidanto de ILEI

El la landoj kaj sekcioj…

Albanio

Rekta metodo ankaŭ por albanoj

Aŭtune 2024, la honorinda, jam forpasinta profesoro Renato Corsetti, sugestis al mi eldoni la bone konatan lernolibron de sinjoro Stano Marĉek „Esperanto laŭ rekta metodo”. Pli frue tion proponis al mi la aŭtoro mem, kvankam mi ne antaŭvidis financan subtenon por tiu celo. Mi tradukis albanen la tekston kaj Stano pretigis la libron provizore.

Printempe 2025, la direktoro de UEA, sinjoro Martin Schäffer, demandis min „kiom kostus 200 ekzempleroj se oni presigus ilin en Albanio? Sed kun ISBN de UEA!” Tio estis komence granda obstaklo ĉar nialandaj eldonejoj ne faris tion antaŭe. Tamen, finfine la eldonejo „Çiraku” en Tirana, laŭ peto de nia prezidanto s-ro Ili Gerdupi, akceptis kaj la laboro startis. Dume, okazis

kelkaj prokrastoj ĉar s-ro Stano mem ne kapablis pretigi la kovrilon, kiun kutime faras lia kara filino, dufoje enhospitaligita. Problemo estis ankaŭ la transpago de 500 eŭroj fare de UEA, ĉar la bankoj postulis almenaŭ 50 eŭrojn. Plie, la sendado de 50 ekzempleroj al UEA postulus krom 60 eŭrojn de la albana poŝtoficejo ankaŭ aldonan monon pagendan en Nederlando, ĉar Albanio ne membras al EU.

Feliĉe tio solviĝis ĉar nia sekretario, la studento Juri Andoni, aliĝis al la UK Brno kaj pretis kunporti tien parton de la libroj. Tiel finiĝis la odiseado de la eldono de nova lernolibro por albanoj aŭ la 46-a versio de tiu metodo de s-ro Stano Marĉek.

Bardhyl SELIMI, Albana ILEI-sekciestro

Belgio

Esperanto en Belgio, lernojaro 2024/2025

Jam dum pluraj jaroj ekzistas manko de instruistoj en Belgio. Tio validas por bazaj lernejoj kaj ankaŭ por mezgradaj lernejoj. Sed, tio estas oportuno por emeritaj instruistoj instrui kelkajn horojn. Tamen, la financa profito por la instruistoj estas limigita. Pli-malpli la duono de la kromgajnita salajro poste reiros al la impostoj. Tial, iom da idealisma motivado estas necesa, deflanke de la emeritaj instruistoj.

Mi sekvis antaŭ nelonge studprogramon en altlernejo por instrui etikon al infanoj de la baza lerneja nivelo. Mi estis scivolema. En la pasinta lernojaro 2024-2025 oni havigis al mi la eblon instrui 6 horojn, po 2 horoj en la 1-a, 3-a/4-a kaj 5-a/6-a jaroj. Temis pri baza lernejo de la flandra komunumo, proksime ĉe Antverpeno. La infanoj de la 1-a jaro ankoraŭ ne scipovis skribi, sed tiuj ekde la 3-a jaro, kompreneble, jes. En la 3-a kaj 5-a jaroj estis ĉinaj lernantinoj kaj mi profitis el tio, por dediĉi iom da tempo al la ĉinaj novjaraj festoj, kulturo kaj lingvo. Antaŭ multaj jaroj mi sekvis vesperlernejan kurson pri la ĉina kaj tio helpis al mi paroli pri la temo.

Unue, mi donis elementan rapidkurson pri la ĉina al la kombino de la 5-a/6-a jaroj. Je mia surprizo la gelernantoj tre ŝatis ekzerci sin pri la skribado de la unuaj lernendaj vortoj kaj frazoj. Ili ankaŭ laŭtlegis tion kune. Post la semajno de la enkonduko de la ĉina, mi donis rapidkurson pri Esperanto. Mi klarigis, ke ankaŭ Esperanto estas sufiĉe facila. Mi jam havis sperton pri la instruado de Esperanto al la 6-a jaro en baza lernejo kaj ankaŭ pro la literaturo mi sciis, ke instrui Esperanton al infanoj 10/11-jaraĝaj povas esti relative sukcesoplena.



Intertempe, mi konstatis, ke ĉiuj ĉinaj infanoj scipovas vere bele skribi ĉine. Mi mem spertis siatempe, kiom da peno kaj zorgemo postuliĝas por vere bone skribi ĉine. Ankaŭ la infano el la 3-a jaro scipovis tre disciplinite skribi la simbolojn. Ĉinaj geinfanoj en Belgio povas sekvi specialan lernejon por tio. (Tio validas cetere ankaŭ por arablingvaj infanoj.)

Do, se ĉiuj gelernantoj en la aĝo de 8/9 jaroj jam scipovas lerni tiom da komplikaj lingvaĵoj, eble ili ankaŭ ensorbos Esperanton same facile kiel la gelernantoj de la plej altaj klasoj. Kaj, efektive, ili montriĝis tre entuziasmaj. Bedaŭrinde tiu kombina klaso de la 3-a/4-a jaro estis tre multnombra grupo de 26 lernantoj. Fakte, preskaŭ mankis seĝoj, sed mi garantias al vi, ke ili havis multe da plezuro pro Esperanto.

André STAES

Ĉinio

Seminario pri Esperanta tradukado en la Zaozhuang-a Universitato

La 28-an de junio 2025 okazis ĉe la Zaozhuang-a Universitato la unua „Seminario pri Tradukado kaj Diskonigado de la Ĉina Kulturo en Esperanto," oficiale subtenata de la registaro de la Provinco Shandong. Bele organizis ĝin la Esperanto-Muzeo. Partoprenis pli ol sesdek homoj el diversaj partoj de Ĉinio, kun kiuj niaj studentaj volontuloj havis la ŝancon praktiki

nian lingvon. La prelegaj temoj iris de AI (Bak Giwan) al tradukoj de la klasika romano *Rugĝdoma Songo* (Arko), de la esperantigoj de ĉinaj filozofoj (Semio kaj Ardo) al rulpentraĵo pri la Silka Vojo (Zhu Lirong), de la korea samideano Elpin (Dekmil) al la verkoj kaj tradukoj de la juna Cicio Mar (Alessandra Madella). La vic-rektoro Chu Fumin, kiu iom lernis Esperanton, afable ĉeestis dum la tuta tempo kaj ankaŭ la aliaj estraranoj montris grandan subtenon al Esperanto en la universitato, kiu intencas gastigi la venontan ILEI-kongreson.



Alessandra MADELLA

Francio

La 14-a AŬTUNAS, la Esperanto-ferioj por plenaĝuloj kaj infanoj: kursoj kaj FEI-ekzameno kun Renée Triolle C1-C2, Dalia Pileckienė B1-B2, Alain Delmotte A1-A2, krome ĥora kantado, origamio, sorobano, sporto, prelegoj, ludoj, turismado: de la 24-a de oktobro ĝis al 2-a de novembro en la franca Esp.-kastelo Greziljono: vidu https://gresillon.org/au?lang=eo, kontakto gresillon@gmail.com

Serbio

La landaj kursoj por komencantoj kroniĝis dum la ILEI-kongreso
Kiel ni jam raportis, en la lernojaro 2024/25 Serbia Esperanto-Ligo (SEL) okazigis 7 plurmonatajn retajn kursojn, inter ili du por komencantoj – aparte por vidantoj kaj por nevidantoj. Fine de tiuj du bazaj kursoj, la 6-an de junio 2025 tri kursanoj decidis ekzameniĝi: **Kristina ILIĆ, Sofija ĐENĐINOVIĆ kaj Nikola ZEKIĆ**.



La ekzameno okazis rete, ĉar du el la kandidatoj, Sofija kaj Nikola, loĝas en la najbara lando Montenegro. La kursojn gvidis (en alfabeta ordo) Aranka LASLO, Nedeljka LOŽAJIĆ kaj Živanko NOVAKOV.

La atestilojn pri la sukcesa ekzameniĝo SEL solene enmanigis dum la ILEI-kongreso en Beogrado, en kiu la tri ekzamenitoj partoprenis aktive: Kristina kaj Sofija partatempe – kiel volontuloj, Nikola tuttempe – frekventante, interalie, ankaŭ la Paroligan kurson de Roberto Guido TRESOLDI.
Pliajn belajn travivaĵojn kaj sukcesojn en Esperantio al ĉiuj!

Aranka LASLO

Svislando

Raporto pri la jaro 2024

Laŭ la membrolisto SIS nombras 11 membrojn. La sekcio ne aktivas. Aktivas CDELI (Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia) kaj tie instruas la SIS-membroj Nicole Margot, Mónika Molnár (membro en la hungara ILEI-sekcio) kaj Luc Allemand. La kursoj nomiĝas *StudSabatoj* kaj okazas unufoje monate dum plena tago. Kvankam organizitaj de CDELI, ili okazadas sub la aŭspicioj de SIS.

Retaj kunvenoj kun Mirejo: tio estas momento por aŭskulti la lingvon, paroli aŭ prelegi, debati aŭ silenti. Ne temas pri kurso, ni ne parolas pri gramatiko. Fidelaj estas kelkaj svisoj kaj ankaŭ eksterlandanoj. Tiaj kunvenoj okazadas dufoje monate. Datoj aperas en *eventaservo.org*. Samaj kunvenoj estis organizitaj je tagmezo por ebligi al azianoj partopreni, sed tio montriĝis vana. La organa strukturo estas SIS.

Agadoj de Mireille Grosjean en rilato kun instruado:
Dum plena februara semajno en la **lertigejo de Rapperswil SG**, kie Raphael Das Gupta, Estrarano de SES, instruas, la enhavo de la instruado estis ekster la kutima horaro. Raphael povis organizi en ĉiu tago lecionon pri Eo. Mirejo kontribuis marde.
De la 9-a ĝis la 15-a de marto en Les Issambres, en Sud-Francio, en **Mediteranea Esperanto-Semajno** (MES), Mirejo instruis al la supera grupo kaj traktis la temon Afriko, en rilato kun la okazonta UK en Tanzanio.
La 23-an de aŭgusto Mirejo iris al **Métabief, franca Ĵuraso**, por renkontiĝi kun la grupo, kiu studis Esperanton en la Abioj de Amikeco kun Anne-Marie Ferrier kaj aliaj gvidantoj.
Fine de la jaro 2024 Mirejo instruis E-on al **geinstruistoj el Burundo rete**. Premiero por ili. Tio povis okazi per diversaj kontaktoj kun burunda ministrino, S-ino Sabushimike.

Sen rilato kun instruado:
Mirejo tra la jaro deĵoris ĉe **Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo** nome de UEA.
Sébastien Moret, membro de SIS kaj profesoro pri la rusa lingvo en la universitato de Lausanne, samtempe prezidas la Amikaron de CDELI.

Forpaso: en la aĝo de 93 jaroj forpasis en novembro 2024 **Claude Gacond**, honora membro de SES, UEA kaj de ILEI (ekde 1999). Festo honore al li okazis la 5-an de aprilo 2025. Broŝuro pri liaj agadoj aperis.[2]

Mireille GROSJEAN 2025-05-23

Gajnintoj de la konkurso Instruistoj de la jaro 2024

1- Gajnintoj de la Juna Instruisto de la Jaro 2024

- Paweł Fischer-Kotowski (Juna Instruisto de la jaro 2024)
- Joel Muhire (Honora Atestilo)
- Ranja Zafinifotsy (Honora Atestilo)
- Alexander/Alekso Vaughn Miller (Honora Atestilo)

2- Gajnintoj de la Instruisto de la Jaro 2024


- Fransoazo Noireau (Instruisto de la jaro 2024)

[2] NdlR: Dum la ĉi-jara UK Mónika Molnár organizis omaĝ-programon honore al Claude Gacond.

- Dennis Keefe (Honora Atestilo)
- Vida Kulikauskiene (Honora Atestilo)

Biografioj de la Gajnintoj de la Instruistoj de la jaro 2024

Instruisto de la jaro:



Françoise NOIREAU estis profesia instruistino kaj psiĥopedagogo, kaj de kelkaj jaroj volontule instruas Esperanton kadre la universitato Espero en DR Kongo. En 2024-25 registriĝis pli ol 250 gelernantoj el 22 afrikaj landoj tra ŝia afrika distanca kursaro kun teamo de 16 help-instruistoj. Dum 35 jaroj ŝi instruis Esperanton en kvar regionoj de Francujo kaj diversaj lokoj de Esperantujo (Rusujo, Tajlando), uzante aktivajn metodojn kiel tabloludojn, skeĉojn kaj rolludojn. Ŝi pionire uzas modernajn teknologiojn por distanca instruado (kiel WhatsApp por Afriko), kaj kreis adaptitan kurson por tujmesaĝa instruado.

Antaŭe, ŝi gvidis klaskorespondadon, estis Duolingo-ambasadoro, lanĉis lingvofestivalon, kaj kunkreis instrumaterialojn (lernoludojn) kun Daniel Lacroze-Marty. Ŝia plej granda feliĉo estas tio, ke ŝiaj tri gefiloj daŭre agadas en Esperantujo, kaj ŝia nepo en Kebekio estas denaska esperantisto.

Honoraj atestiloj:

Dennis KEEFE estas profesia lingvo-instruisto (MA TEFL, MBA), universitata programestro kaj instruisto pri merkatiko, kiu kreis la plej intensan Esperanto-kursaron nuntempe - Esperanto-Plaĝon en Hispanio, 61-tagan programon kun 8 horoj ĉiutage en aprilo kaj 4 horoj ĉiutage en majo, atingante 650-862 ĉeestajn instruo-horojn plus pli ol 200 virtualajn horojn en 2024-2025. Li verkis abundajn instrumaterialojn inkluzive de la BEK-serio (kvar libroj pri Esperanta sintakso), ekzercaron por Don Kiĥoto (3024 ekzercoj), Praktika Bildvortaro (pli ol 2000 ekzercoj), kaj aliajn specialajn kursojn por ĉiuj KER-niveloj. Krom sia instruado, li kunlaboris kun NASK, Gresillon, ILEI, UEA, kreis Lingvajn Festivalojn, estis ĉefa eksterlanda Esperanto-instruisto en Ĉinio dum jardeko, kaj nun preparas novajn kursojn inkluzive de Robinson Crusoe-ekzercaro.

Vida KULIKAUSKIENĖ, prezidantino de la Esperanto-klubo „Revo” en Paneveĵis (Litovio), konatiĝis kun Esperanto infanece, ekinstruis en 2013,

unue al sia filino kaj klubanoj. Ŝi aliĝis al la projekto Ekparolu en 2017 kaj estas tre aktiva „onklino”. Ekde tiam ŝi okazigis pli ol 400 parolsesiojn, ofte preparante lernantojn ankaŭ por la KER-ekzameno. En 2018 ŝi estis nomita „La plej diligenta onklino” de la jaro. Ŝi gvidis Zoom-kursojn por la Londona Esperanto-Klubo, inkluzive de kurso por B2-nivela ekzamena preparado. Dum virtualaj kaj ĉeestaj kongresoj ŝi kelkfoje gvidis diversnivelajn Esperanto-kursojn. Ekde 2022 ŝi instruas ankaŭ ĉe la Universitato de la Tria Aĝo en sia urbo. Ŝi uzas materialojn de edukado.net, lernu.net, la rektan metodon de Stano Marĉek, kaj kunlaboras kun instruistoj el diversaj landoj; krome ŝi mem kreas taskojn por plivigligi kaj diversigi sian instruadon.

Juna Instruisto de la jaro

La gajninto:



Paweł FISCHER-KOTOWSKI (n. 1990) estas pola bibliotekisto kiu ekde 2022 vivas en Nederlando kaj laboras en la Reĝa Biblioteko en Hago. Esperantist-iĝinte en 2005, li studis interlingvistikon en Poznano (2009–2013) kaj trapasis KER-ekzamenojn ĝis inkluzive la C2-nivelo.

ILEI/UEA-ekzamenanto ekde 2012 kaj membro de la KER-Ekzamena Centro ekde 2025. Li estas tre aktiva instruisto kun pli ol 400 sesioj en la programo „Ekparolu!” kaj gvidas kursojn en diversaj retaj kaj ĉeestaj aranĝoj, inkluzive de la nederlanda kaj belga studsemajnfinoj kaj staĝoj en la franca kastelo Grésillon. Krom instruado, li aktivas en la Esperanto-movado kiel redaktoro de pluraj revuoj (*La Ondo de Esperanto, Kontakto, Fenikso*), estis ĝenerala sekretario de TEJO (2012–2014), komitatano A de UEA (2011–2016), kaj kunorganizis gravajn aranĝojn kiel la 72-an IJK en Vroclavo, montrante ampleksan kaj longdaŭran kontribuon al la Esperanto-komunumo.

Honoraj atestiloj:

Joel MUHIRE, 36-jara el DR Kongo, eklernis Esperanton en 2008 en Rutshuru, kie tiam estis preskaŭ neniu esperantisto; li piediris 10 km dimanĉe por lerni, poste pioniris instruadon en sia urbeto Kiwanja, kie li fondis klubon, disvastigis Esperanton per kvar lokaj radiostacioj kaj enkondukis ĝin en orfan lernejon. Li kreis klubojn ankaŭ en Bunagana (ĉe la landlimo kun Ugando) kaj en Shanje (Suda Kivuo). Krom instruado ĉeeste kaj rete, li

aktivas kiel muzikisto, ILEI-sekciestro en DR Kongo, eks-sekretario de la Afrika Komisiono de UEA, aŭtoro de lernolibro en la svahila kaj redaktoro de la revuo Konga Stelo. En 2021 lia klubo Rondo Esperantista de Kiwanja, kunlabore kun la kina grupo Ciné Club la Patience, realigis la filmon Kvazaŭ korpo sen koro, kiu spekteblas en Jutubo. La daŭra milito en la orienta Kongo malhelpas lian agadon, tamen li persiste kontribuas al la movado malgraŭ la malfacilaj kondiĉoj.

Ranja ZAFINIFOTSY, 28-jara direktorino de granda lernejo en Antananarivo, Malagasio, estas tre aktiva junulino en la instruado kaj disvastigado de Esperanto. Ŝi mem eklernis la lingvon en 2018 kaj poste instruis ĝin al multaj lernantoj, el kiuj almenaŭ kvin fariĝis instruistoj kaj prelegantoj en la Malagasa E-Seminario de februaro 2025, kiun ŝi ankaŭ organizis. Ĉirkaŭ 32 el 42 partoprenantoj en tiu aranĝo lernis Esperanton rekte aŭ nerekte de ŝi. Ranja verkis infanlibron Semoj de amikecoj, kaj ŝia laboro jam ricevis internacian atenton. Ŝi estas bone ligita kun la Esperanto-komunumo kaj inspiras daŭran agadon inter junaj malagasoj.

Alekso MILLER, 35-jara usonano el Atlanta (Georgio), bakalaŭriĝis pri teatro kaj magistriĝis pri instruado de la angla ĉe la Universitato Liberty. Li eklernis Esperanton en 2013, trapasis la KER-ekzamenon je la nivelo C1 en 2019, kaj instruis ĉe la Aŭstralia Somera Kursaro en 2022. Kiel edukisto, li verkis kvin dulingvajn porinfanajn librojn kun gramatikaj gvidiloj, eldonitajn de Amazon, kaj produktis pli ol 200 edukajn filmetojn por sia Jutuba kanalo Exploring Esperanto, inkluzive de lecionoj, monologoj, kaj vlogoj. Liaj libroj kaj filmoj estas ofte uzataj kiel lernomaterialo, inkluzive en UEA.facila. Li ankaŭ aktivas kiel spertulo en la Fejsbuka grupo Esperanto Learners kaj li fondis la Usonan Bonan Film-Festivalon, kiu jam produktas pli ol 175 filmojn en Esperanto.

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (*prez., dumtempe pluservanta ĝis la venonta elekto*)
Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Aristophio Alves Filho.
Kontrola: Simon Smits, Nvard Manveljan.
Lerneja: Julián Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Oberrauch, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.
Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill.

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Gong Xiaofeng „Arko", Goro Kimura, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Kristin Tytgat, Vicente Manzano-Arrondo, Radojica Petrović, Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 15)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, *info@ikso.net*. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: *http://www.ikso.net/eo/.*

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: *redaktanto@edukado.net.*

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983. Trejnsesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, *zsofia.korody@esperanto.de.*

IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la retpaĝon de UEA.*

TEJO (http://www.tejo.org/): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Aimé-Patrick Manirakiza**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Albert Stalin Garrido.**

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, *www.uea.org*. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Ahmad Reza Mamduhi.** Observanto de UEA ĉe ILEI: **Arko (Gong Xiaofeng).**

LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj): prez. **Nedeljka Ložajić**, *nedeljkalozajic@gmail.com*.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE *(Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo)* Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**.

FIPLV *(Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj)*

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro.**

Unesko (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Alessandra Madella,** *a.madella@tiscali.it*, **Didier Janot,** *didier.janot@gmail.com,* **Emmanuel Desbrières** kaj **Maximiliano Garcia**.

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 25 € en A-landoj kaj 12,50 € en B-landoj, kun ricevo de 4 paperaj kaj bitaj numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al la reta versio de IPR membreco kostas 12,50 € por la A-landoj kaj 6,25 € por la B-landoj. Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan IPR kaj paperan *Juna Amiko* (JA). Tio kostas por A-landanoj 40 € kaj por B-landanoj 22,50 €. Abono de JA papera (kune kun la bita) kostas 18 € en A-lando, 13 € en B-lando. Abono de JA bita kostas 11 € en A-lando, 7 € en B-lando. **Lando-kategorioj: B-landoj**: iamaj

socialismaj landoj de Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.), Afriko, Ameriko (escepte de Usono kaj Kanado), Kiribati, Papuo-Nov-Gvineo, Solomonoj, Vanuatuo en Oceanio. **A-landoj**: ĉiuj landoj escepte de tiuj de kategorio B. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por JA akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al **Karine ARAKELJAN**, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio, *ilei.kasisto@gmail.com*. Bv klare indiki la celon de via pago.
La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de via sekciestro aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:
a) Pagoj al la sekciestro alvenos al ILEI kune kun tiuj de la aliaj membroj de la sekcio. Vi jam estos en la sekcia listo kaj ne devos mem sendi la aliĝ- aŭ la abon-formularon.
b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Se vi ne mem posedas UEA-konton, por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Se vi ne estas en la sekcia listo, bonvolu mem sendi la aliĝ- aŭ la abon-formularon (aliĝilo: https://www.ilei.info/Aligxilo.pdf; abon-formularo por *Juna Amiko*: https://www.ilei.info/Juna_Amiko.pdf). Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al la ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 30 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.
* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub la numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).
* Retpaĝo de ILEI: *http://www.ilei.info*.

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto: dr. MURÁNYI Péter, *HU-9730 Kőszeg, Rákóczi u. 111.* **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario, jozefo.nemeth@gmail.com*, tel*: (+36-70) 931-0530.* Peranto de ILEI kadre de LIBE: Olena Poshivana, *olenaposivana@gmail.com*.
La adreso de nia arkivo: https://www.ilei.info/revuoj/ipr-arkivo.php.
Ni fermis la nunan numeron la 15-an de aŭgusto 2025,
redaktofino por la sekva numero: la 31-an de oktobro 2025.



La 58-a Kongreso de ILEI en Beograd:

Sur la foto supre: Kongresa kurso por komencantoj Raia Androvska kun la partoprenantoj

Sur la foto malsupre: Dumkongresa Paroliga kurso gvidata de Roberto Guido Tresoldi

